Stefano Keller Invitis UN-Kunsidantaron al UK

Foto: Stefano Keller kaj Rita Izsák

Paralele kun la 23a sesio de la Homrajta Konsilio, disvolviĝis la 6an kaj 7an de junio la “Fakula kunsido pri la rajtoj kaj sekureco de religiaj minoritatoj” en la ĉefa Oficejo de la Alta Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj en Ĝenevo. La kunsidon gvidis Rita Izsák, la UN-ĉefo pri minoritataj aferoj.

La komisiitoj de UEA Verena Graf kaj Stefano Keller partoprenis la eventon. Krom kelkaj ŝtataj reprezentantoj ĉeestis pluraj fakuloj, juristoj, raportantoj de UN kaj delegitoj de NRO-j.

Post prelegoj pri la bazaj konceptoj, diversaj kazoj kaj situacioj estis prezentitaj. Koncerne rajtojn kaj sekurecon pri religi-rilataj aferoj, la realeco povas esti tre kompleksa laŭ tio, ĉu temas pri rilato inter anoj de religio kaj la ŝtato, aŭ inter la religia komunumo/gvidantaro kaj ties anoj, kaj laŭ tio, ĉu temas pri ‘ŝtatreligio’, ktp. Libereco pri praktikado kaj geedziĝaj, religio-ŝanĝaj situacioj estis prezentitaj. La aliro de la problemoj povas esti eĉ pli komplika, kiam temas pri diversaj identecaj aspektoj samtempaj: etna, religia aŭ lingva apartenoj.

Temis ankaŭ pri la efiko de la “etikedo”, t.e. nomado, kion la anoj de iu minoritata grupo ricevas kaj kiuj difinas ilian minoritatgrupan apartenon. Tio povas esti perceptata kiel io pozitiva (ekz. “religia komunumo” estas pli pozitiva ol “sekto”), aŭ negativa (“minoritata”, do pli “malaltrangula” ol la aliaj). Kelkfoje la minoritata statuso povas doni al civitanoj privilegiojn rilate al la plimultanoj.

Reprezentantino de la Internacia Bahaa Komunumo interparolis kun la komisiitoj de UEA kaj klare esprimis sian simpation al la Esperanto-movado; la bahaanoj ja dezirasuzi komunan interkomprenan lingvon neŭtralan.

Antaŭ la fino de la kunsido, Stefano Keller kiel la lasta alparolanto reagis al la disvolviĝo de la evento, bedaŭrante ke ĝi okazis nur en la angla lingvo, sen interpretistoj kaj sen eblo uzi alian UN-lingvon. Li atentigis, ke sekve pluraj interesatoj estis elfermitaj de la kunsido. Li alvokis pri serioza konsidero de la lingva aspekto de komununa kunvivado, pledante por pli da atento al tiu grava komponento de la homaj rajtoj.

Sian alparolon li finis invitante la kunsidantaron al la UK en Rejkjaviko, kie ĝuste la temo “justa komunikado” estos traktata.

Sonregistraĵo de la alparolo: http://goo.gl/uxiNl

La teksto aperos ĉe http://www.linguistic-rights.org/eventoj/ kaj en la retejo de UN.

Tiu kunsido ebligis al la estrarano de UEA transdoni al s-ino Rita Izsák ekzempleron de la junia numero de la revuo Esperanto, en kiu aperas ŝ
ia teksto pri Esperanto 125-jara.

Oficejo de Universala Esperanto-Asocio ĉe Unuiĝintaj Nacioj:
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041
www.esperantoporun.org

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041